

ESPERANTO

JANUARO 1960

53 a Jaro - N-ro 650 (1)

V-4252/53 (1960)



esperanto

JANUARO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 650 (1)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
Sino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estrararo de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜO MONTRAS :

Bruselo, la urbdomo nokte.

Enhavo

En la Nova Jaro	1
Jules Verne kaj Esperanto	2
I.A.T.F.A.	2
Ĉefurbo de nia kontinento	9
Antaŭkongreso	9
Belgujo - Leuven	9
La silka vojo	10
Oficiala trandono de la ŝipo "Zamenhof"	12
Precizigo de la Redakcio	18

Rubrikoj :

Okaze de la Zamenhof-jaro	3
Tra la Mondo	13
La juna Vivo	15
45-a U.K.	16
Radio	17
La internaciaj konkursoj	18
Oficiala informilo	18

Manuskripto por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

En la Nova Jaro

En la fino de la jaro estas kutimo fari bilancon. La bilanco de la Esperanto-Movado estas ĉi-foje ankoraŭ pli pozitiva ol en la lastaj jaroj. La transiron de 1959 al 1960 markas du eventoj: la kulmina punkto de la Zamenhof-jaro kaj la decido de la Komitato de la 15-a de decembro.

En la momento, kiam estas skribataj tiuj ĉi linioj, plue okazas en diversaj mondopartoj solenaj aranĝoj por memorigi la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof kaj por emfazi la gravecon de lia verko. Tial la finaj rezultoj ankoraŭ ne estas, nek povas esti konataj. Ilin oni ekscios nur post kelkaj semajnoj kaj ili estos publikigitaj en la Zamenhof-Memorlibro aperonta post nelonge.

Tamen, jam nun, surbaze de kelkaj persone konstatitaj faktoj kaj laŭ pluraj ricevitaj informoj, estas eble antaŭvidi kun granda verŝajno, ke ĉie la decembraj aranĝoj estis bonaj, kelkloke eĉ elstare altnivelaj, kaj ke tial ilia efiko por la plua disvastigo de la lingvo estos tutcerte konsiderinda.

Unesco Courier — la ĉefa periodaĵo de Unesko — publikigis en sia decembra numero tre bonan artikolon pri la aŭtoro de la Internacia Lingvo kun portreto de Zamenhof. La artikolo aperis en la kvar eldonoj: la angla, franca, hispana kaj rusa.

Okazis solenaj kunsidoj, publikaj aranĝoj kaj internaj kunvenoj de la Esperanto-Organizaĵo.

La subskribinto partoprenis persone en kelkaj solenaĵoj organizitaj de la Esperanto-Societoj aŭ de specialaj lokaj komitatoj. En Bruĝo, Bruselo kaj Antverpeno entute ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj. En Hago ambaŭ aloj de la salono estis plenplenaj: pli ol 200 personoj partoprenis. En Arnhem la feston ĉeestis ĉirkaŭ 80 personoj. En Essen la salono estis plenŝtopita: multaj alvenis ankoraŭ el la apudaj urboj. En Hamburgo la aranĝo, tre altnivela, daŭris de la 4,30 posttagmeze ĝis la 2-a horo matene. La programo konsistis el festparolado, muzikaj punktoj, teatraĵo, bankedo kaj balo.

La krono de tiuj kelkaj aranĝoj en la ĉeno inter Bruĝo kaj Danlando estis Kopenhago. Tiu brila solenaĵo meritas tute specialan mencion, ĉar ĝi estis el ĉiuj vidpunktoj vere modela, kaj oni povas nur esperi, ke la aliaj ĉefurboj — almenaŭ ili — havis similajn bonegajn festojn.

La solenaĵon en Kopenhago antaŭpreparis speciala komitato, en kiu estis reprezentitaj ĉiuj Esperanto-Societoj de la dana ĉefurbo, kaj kies animo estis Kirsten Zacho kaj prezidanto Aage Bense. La festo okazis en la Palaco Grafo Moltke la 15-an de decembro. La luksan salonegon, taŭge ornamitan kaj brile iluminitan, plenigis ĉirkaŭ 300 personoj. Ĉeestis la Ministro de Internaj Aferoj, s-ro Søren Olesen; la Ministro de Financoj, s-ro Viggo Kampmann; la Ambasadoroj de Pollando, s-ro Stanislaw Wincenty Dobrowolski, kaj

de Meksikio, s-ro Prof. Aurelio Manrique; la Kulturaj ataŝeoj de Germanujo, Ĉinujo, Ĉeĥoslovakio kaj Rumanujo; pluraj aliaj personecoj de la publika vivo, inter kiuj la vicdirektoro de la publika instruado de Danlando, la programdirektoro de la radio, la ĉefo de la urba biblioteko, parlamentanoj k.a. Alvenis speciale por la vespero ankaŭ la prezidanto de la S.E.F., s-ro Jan Strønne, kaj pluraj gastoj el Malmø, Lund kaj eĉ Stokholmo. La duhora programo konsistis el kelkaj muzikaj punktoj artisme prezentitaj de profesiaj muzikistoj, salutparoladoj, deklamadoj. La vespero komenciĝis per Prologo de Paul Thorsen. La Ministro, s-ro Søren Olesen, bondeziris en Esperanto kaj akcentis, ke li mem lernis la lingvon antaŭ 25 jaroj. La Meksika Ambasadoro, kiu evidente mem bone konas la strukturon de Esperanto, deklaris, ke laŭ li la verko de Zamenhof estas unu el la plej noblaj kreaĵoj de la homo. La germana kulturataŝeo, s-ro d-ro Wolf-Dietrich Müller, parolis pri la kultura signifo de la Internacia Lingvo. S-ro Strønne prezentis la komenciĝon de Esperanto en Skandinavio. La prezidanto de CDEL, s-ro Svend Dragsted, faris paroladon en la dana pri la Esperanto-Movado en Danlando. La festparoladon de la subskribinto enkondukis la Revolucia Etudo de Chopin, kiun brile interpretis Niels Bondesen. La programo finiĝis per la kantado de la Espero. La tuta aranĝo lasis plej profundan impreson kaj la diversaj oficialaj reprezentantoj ne havis sufiĉe da vortoj por esprimi siajn gratulojn kaj bondezirojn. Sekvis supeo en la blanka salono de la palaco, dum en la aliaj salonoj, ĉiu el ili kun sia aparta ĉarmo, malgrandaj grupoj agrable konversaciis ĝis la momento kiam komenciĝis la balo, kiu daŭris ĝis la frumatenaĵoj. Granda preskonferenco okazis en la posttagmezo. Rezulte, nur en Kopenhago aperis 4 grandaj kaj 7 malgrandaj artikoloj en la gazetaro. La radio raportis pri la aranĝo kaj speciala elsendo kun unuopaj eroj el la programo estos farita komence de januaro.

La dua grava evento estas la decido de la Komitato de la 15-a de decembro. Per skriba voĉdono la Komitato decidis, surbaze de la Kongresa Rezolucio de Varsovio, entrepreni la necesajn paŝojn por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Pro la graveco de tiu ĉi decido, ĝia signifo estos pritraktita en la sekvanta numero de la revuo. La decido prezentas la bazon de agado de la Asocio sur tiu ĉi kampo en 1960 kaj en la sekvantaj jaroj.

La dinamisma finiĝo de 1959 estas bona kaj tre esperiga aŭguro por la Nova Jaro. En 1960 la Esperantismo faru plian paŝon antaŭen kaj por ĉiu unuopa esperantisto ĝi estu feliĉa kaj prospera!

Ivo Lapenna

JULES VERNE KAJ ESPERANTO

La surluniĝo de *LUNIK 2*, kaj la rivoluado de *LUNIK 3*, ĉirkaŭ tero kaj luno, revokas en ĉies memoro la nomon de la franca romanisto Jules Verne, kies verkoj estas tradukitaj en preskaŭ ĉiujn lingvojn.

En sia verko, publikigita en la jaro 1865-a : "De la Tero ĝis la Luno", la genia profetinto okazigas la daŭron de la trajektorio en 97 horoj 20'. Trione malpli da tempo vojaĝis la rusa raketo por atingi sian celon kaj tio realiĝis malpli ol jarcenton post kiam Jules Verne ĝin antaŭvidis.

Sed por ekzakte konsideri lian genian intuicion, necesas situigi la epokon dum kiu Verne vivis : tiam la unuaj vaporŝipoj ekkrozis de Eŭropo al Ameriko (1863), apenaŭ komenciĝis la konstruado de la transsiberia fervojo (1891), kaj depost la aerostato de Montgolfier (1783) ankoraŭ ne estis alkalkulebla alia serioza progreso en la aerveturado.

Tamen, en la viziula imago de Verne, jam ŝipoj krozadas submare, artefaritaj insuloj flosas, flagras pluretaĝaj fuzaĵoj en aliajn mondojn....

Cu li ekkonsciis ke la civilizado estos iam minacata de la ĉiam pli potencaj teknikaj fortoj ? Mi opinias ke jes.

Idealisto kaj pacisto, Jules Verne, pioniro de ĉia homa progreso kaj scivolema pri ĉiu nova eksperimento, simpatiis al Esperanto.

Tiu ĉi fakto estas apenaŭ konata.

Ĉirkaŭ la jaro 1880, li, tiam loĝanta en Amiens (en norda parto de Francujo), ligiĝis kun juna, elokventa deputito en la Franca Asembleo : S-ro Raoul Duval, kaj ofte gastigis lin en sia jaŭto.

Raoul Duval estis fanatika Volapukisto, kaj S-ino Marguerite Allotte de la Fuye, nevino de Jules Verne kaj lia biografino opinias ke el la konversacioj kun Raoul Duval, la aŭtoro de la "Eksterordinaraj Vojaĝoj" ĉerpis sian intersiĝon pri Esperanto.

Tiam, Verne, kiu kunigis ĉirkaŭ si ĉiujn kulturitajn homojn de la urbo Amiens, amikiĝis ankaŭ al S-ro Charles Tassencourt, fondinto de la tiea esp-ista grupo, kaj konsentis fariĝi ties Honor-Prezidanto.

Ve ! Jules Verne mortis en la jaro 1905. Pri la unua U.K. de Esperanto li ne eksciis kaj tro frua morto senigis nin de la projektita romano kiun li intencis verki favore al Esperanto.

Marcel Delcourt

NOVA ESPERANTA FAKA ASOCIO :

Internacia Asocio de Teatraj kaj Filmaj Artistoj (I.A.T.F.A.)

Pro la aparte multenombra partopreno de teatraj artistoj en la teatraj aranĝoj dum la 44-a U.K. en Varsovio, altrudiĝis memkompreneble la ideo de komuna kunveno inter ili kun la celo de reciproka interkonatiĝo, fakaj pridiskutoj sen antaŭdifinita tagordo kaj eventuala starigo de internacia faka asocio.

Okazis du kunvenoj. La unua vendrede, la 7-an de aŭgusto, vespere post la prezentado de Internacia Arta Teatro. Ĝin ĉeestis nia eminenta samideano kaj pioniro sur teatra kampo sinjoro Julio Baghy, fraŭlino Marjorie Boulton, la reprezentantoj de la tri teatraj grupoj kiuj ludis dumkongrese kune kun la aktoraroj, sinjoro Jean Forge, konata pola filmreĝisoro kaj eminenta esperantisto, sinjoro Lech Piotrowski, dramaturgo de Bialistoka teatro, sinjoro Remigius Kossakowski, opera kantisto, kaj pluraj polaj eminentaj teatraj artistoj kaj aktoroj. Entute kvardeko da personoj.

Enkondukan parolon diris sinjoro Julio Baghy kiu atentigis pri kelkaj problemoj kiuj staras antaŭ Esperanta teatro. La enkondukaj vortoj rezultigis viglan diskuton. Ĝi ĉefe direktiĝis al la baza deirpunkto por Esperanta teatro, nome la ĝusta kaj modela prononcado. En tiu diskuto al sinjoro Baghy kontraŭstaris sinjoro Flego, sed en ĝi partoprenis ankaŭ fraŭlino M. Boulton, gesinjoroj Szemannovi, sinjoro Kossakowski, fraŭlino J. Ravŝelj kaj aliaj.

Morgaŭan tagon okazis dua kunveno. Bedaŭrinde ĝin ne partoprenis kelkaj partoprenintoj de la unua kunveno kaj kelkaj devis baldaŭ forlasi ĝin pro forvojaĝo. Kom-pense tiun kunvenon ĉeestis la reprezentanto de beograda Esperanta teatra grupo sinjoro A. Sekelj.

Fine de tiu kunveno — laŭ iniciato de la polaj artistoj — estis fondita Internacia Asocio de Teatraj kaj Filmaj Artistoj (I.A.T.F.A.) kun jena estraro :

Prezidanto : Flego Srdjan

Vicprezidanto : Jovan Putnik

Sekretario : Lech Piotrowski

Komitatano por muziko : Remigiusz Kossakowski

Komitatano por filmo : Jean Forge

Komitatano : Mladen Serment

Oni pridiskutis la celojn de I.A.T.F.A. kaj faris kelkajn decidojn. I.A.T.F.A. skize celas :

Instigi ĉiujn aktivajn profesiajn Esperantajn artistojn sur teatra kaj filma kampoj aniĝi al ĝi. (Aniĝojn akceptas sekretario sinjoro Lech Piotrowski, Bialystok, Teatr im. Wegierki.)

Interesigi pli forte la oficialajn Esperanto-instancojn kaj la tutan Esperanto-movadon pri la problemoj de la Esperanta teatro.

Doni ĉiun eblan teknikan kaj moralan helpon kaj apogon al naciaj esperantaj teatraj grupoj jam ekzistantaj, instigi al fondiĝo de novaj naciaj trupoj kaj doni apartan apogon al Internacia Arta Teatro (I.A.T.).

Instigi kaj helpi la diskuton pri la Esperanta fonetiko kaj proponi praktikajn kaj ĝustajn solvojn por lernado de modela Esperanta elparolo surbaze de jam ekzistanta internacia modela prononcado. (Evidente oni devos revizii ĉion kion oni ĝis nun pli aŭ malpli ĝuste skribis pri Esperanta fonetiko.)

Krome oni decidis, ke sinjoro Flego preparos bazan statuton de I.A.T.F.A. En la postaj tagoj la prezidanto kaj sekretario dufoje renkontiĝis kaj abunde pridiskutis la estontan agadon.

Flego Srdjan

(Oni petas ĉiujn redakciojn represi tiun-ĉi artikolon. Sinjoro Flego krome petas ĉiujn fotoamatorojn kiuj fotis la prezentadon de la "Friponaĵoj de Skapeno" afable sendi kopiojn aŭ negativojn al lia adreso : Flego Srdjan, 67 bd. Pasteur Paris XV).

La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo (*)

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de

L. L. Zamenhof

verkita por C.E.D. de William Auld

III

Mi nun aldonos komparajn specimenojn de poemtradukado. La limoj de tiu ĉi studo ne ebligas doni amason da tiaj specimenoj, sed per detala studado de kelkaj ekzemploj oni povas ricevi utilajn ĝeneralajn impresojn. Iuj skeptikuloj eble opinios, ke mi tre zorge elektis miajn specimenojn kun la celo, doni kiel eble plej favoran impreson pri la esperanta teksto en komparo kun la naci-lingvaj tekstoj, sed tion mi ne faris. La rezultoj de mia elekto estas tiurilate hazardaj; efektive, mi definitive elektis miajn specimenojn antaŭ ol fari iun ajn pli profundan analizon de la diversaj tradukoj. Kompreneble, la elekto ne povis esti tute hazarda. Tri kriterioj gvidis min al la subaj specimenoj:

(i) La originalo devis esti poemo kun rekonata literatura graveco kaj valoro;

(ii) Devis esti troveblaj tradukoj en du aliaj lingvoj; tiuj tradukoj mem devis havi altgradan estetikan valoron (29), por ke la diskuto, laŭ la celoj de la komparo, povu ignori tiun aspekton de la tradukoj kaj koncentriĝi je la senca fideleco; per malbonaj tradukoj oni povus nenion pruvi

krom la nekompetenteco de la tradukintoj, sed se la tradukoj jam atingas certan nivelon oni rajtas fari konstatojn ankaŭ pri la lingvoj uzitaj;

(iii) La specimenoj devis esti relative mal-longaj; estintus tre interese analizi pli longajn ĉerpaĵojn el ekzemple *Peer Gynt* kaj *Infero*, sed tion la spaco ne permesis.

Aparte grava estis la p-to (ii). Se poemtraduko mem ne donas poeziecan impreson, ĝi donas nenion. Fundamente, mi konsentas kun Peter Green:

„Poemo... estas nedividebla tutaĵo: la tradukanto ne rajtas arbitre koncentriĝi je la formo je kosto de la signifo, aŭ inverse”.(30)

Formoj kaj signifo egale kontribuas al la poezieco: eventuale oni rajtas rezigni pri la originala formo, kvankam kun domaĝo, *kondiĉe ke la traduko havu propran poeziecan formon*: tio evidente ekskludas prozajn „tradukojn” de poeziaj verkoj. Ĉu Homero estas giganta pro siaj rakontoj? — ne, li ne estas. Li estas giganta pro la formo (ritmo, esprimaro, ekzalta lingvaĵo), per kiu li prezentis siajn rakontojn.

Ni transiru do al niaj konkretaj specimenoj. (Uzitaj mallongigoj: A.: angla; E.: esperanta; F.: franca; R.: rusa.)

SPECIMENO A:

L'ALBATROS

de Charles Baudelaire
Franclingva originalo

Souvent, pour s'amuser, les hommes d'équipage
Prennent des albatros, vastes oiseaux des mers,
Qui suivent, indolents compagnons de voyage,
Le navire glissant sur les gouffres amers.

A peine les ont-ils déposés sur les planches,
Que ces rois de l'azur, maladroits et honteux,
Laissent piteusement leurs grandes ailes blanches
Comme des avirons traîner à côté d'eux.

Ce voyageur ailé, comme il est gauche et veule!
Lui, naguère si beau, qu'il est comique et laid!
L'un agace son bec avec un brûle-gueule,
L'autre mime, en boitant, l'infirme qui volait!

Le Poète est semblable au prince des nuées
Qui hante la tempête et se rit de l'archer;
Exilé sur le sol au milieu des huées,
Ses ailes de géant l'empêchent de marcher.

Formo :

La F. aleksandrojn tradukas E. per aleksandroj, A. per kvinjamboj. Diferenco inter F. kaj E. aleksandroj estas ĉefe tio, ke la unua havas viran cezuron, la dua inan, konforme kun la ĝenerale ina formo de la vortaro. Tamen E. reproduktas la sinsekvon de inaj kaj viraj rimvortoj de F., kion A. ne faras. Ĝenerale, do, E. estas laŭforme pli proksima al la originalo.

Titolo :

Koincido de terminoj ebligis al ambaŭ tradukintoj reeĥi la originalan titolon.

Komentaro :

v.1. Nek E. nek A. precize tradukas la signifon de F. *souvent*, sed ambaŭ iom mildigas ĝin. A. retenas la s-aliteracion; E. sonakordiĝas per foje kaj *amuzo* al F. *-vent* kaj *s'amuser*. Kvankam A. *loafing* bonege respondas al la etoso de la originalo, ne ekzistas por ĝi pravigo en la F.

v. 2. A. *snare* pli poeziecas ol E. *kapt-akiras*, kaj eĉ ol la F. *prennent*. Iom perdiĝas la sento de F. *vastes*, kvankam E. provas redoni tiun senton kaj sonon per aldono de la alie ne motivita *vent-*. E. *mar'* akordiĝas kun F. *mers*. Mankas la varianto F. *albatros-oiseaux* en A.

v. 3. F. *suivent*, E. *iras post*, mankas en A. Estas dubinde, ĉu A. *indolent* sence respondas al F. *indolents* en tiu ĉi kunteksto; E. *indiferentaj* ŝajnas tiurilate pli trafa.

v. 4. A. *through the vastitudes* tute ŝanĝas la sencon de F. *sur les gouffres*, kiun precize redo-

(*) La unuan kaj duan partojn de tiu ĉi studo vidu en la oktobra kaj novembra n-roj de "Esperanto", 1959.

LA ALBATRO
de Charles Baudelaire
Esperanta traduko de K. Kalocsay (31)

Kelkfoje, por amuzo, ŝipanoj kapt-akiras
Albatrojn, ĉi grandegajn ventbirdojn de la mar',
Kiu, indiferentaj vojaĝkunuloj, iras
Post ŝip' glitanta super amara abismar'.

Apenaŭ ili estas metitaj ŝipoplanke,
Ĉi reĝoj de l' lazuro, mallerte kaj kun ĝen',
Grandajn flugilojn blankajn jen trenas ambaŭflanke,
Kiel remilojn pezajn, kun kompatinda pen'.

Ĉi vojaĝant' flugila inerte nun hezitas.
Ĵus nura bel', kaj nune: malbel' komika jam.
Jen, iu ĝian bekon per kurba pip' incitas,
Alia ĝin, fluginton, imitas dum la lam'.

Similas la poeto al tiu princ' de l' nuboj,
Kiu la ŝtormon ĝuas, kaj ridas je l' pafant',
Kaj kiun, tere, sube, ĉe mokrideg' de buboj,
Malhelpas iri ĝiaj flugiloj de gigant'.

THE ALBATROSS
by Charles Baudelaire
Angla traduko de Roy Campbell (32)

Sometimes for sport the men of loafing crews
Snare the great albatrosses of the deep,
The indolent companions of their cruise
As through the bitter vastitudes they sweep.

Scarce have they fished aboard these airy kings
When helpless on such unaccustomed floors
They piteously droop their huge white wings
And trail them at their sides like drifting oars.

How comical, how ugly, and how meek
Appears this soarer of celestial snows!
One, with his pipe, teases the golden beak,
One, limping, mocks the cripple as he goes.

The Poet, like this monarch of the clouds,
Despising archers, rides the storm elate.
But, stranded on the earth to jeering crowds,
The great wings of the giant baulk his gait.

Ĝenerala konkludo pri Specimeno A: La esperanta traduko estas forme kaj vorte pli proksima al la originalo kaj sukcesas reprodukti ties ideojn kaj

SPECIMENO B:

THE TIGER
by William Blake
Anglalingva originalo

Tiger! Tiger! burning bright
In the forests of the night,
What immortal hand or eye
Could frame thy fearful symmetry?

nas E. *super abismar'*. F. *glissant*, E. *glitanta*, — A. *sweep*, kvankam sence iom alia, tamen eble ne malbona (preciza A. traduko estus *glide*). F. *amers* sonakordiĝas kun E. *-mar'*.

v. 5. La aktiva F. *les ont-ils déposés* fariĝas pasiva en E. *ili estas metitaj*; kvankam A. redonas la aktivecon kaj la inversion de F., tamen la bildo estas iom alia: *have they fished aboard*. F. *sur les planches*, E. *ŝipoplanke* troviĝas nur en la posta verso kiel A. *floors*, vorto tamen iom nekonvena rilate ŝipon!

v. 6. E. tre proksime reproduktas la F. sonojn de tiu ĉi verso. F. *de l'azur* fariĝas A. *airy*. F. *maladroits* adverbiĝas en E. *mallerte*; sed A. *helpless* ne precize redonas la signifon. F. *honteux* kaj E. *kun ĝen'* sence tute samas; tiun ĉi nuancon A. redonas nur sugestie pere de *unaccustomed*, kiu tamen jam rilatas al substantivo *floors* kaj ne kiel en F. *honteux* al *rois* (A. *kings*).

v. 7. F. *laissent traîner* perdas iom da potenco en E. *trenas*; A. *droop and trail* estas pli trafa kaj ankaŭ pli esprimiva. F. *piteusement*, A. *piteously*, reaperas nur poste kiel iomete pli malforta E. *kun kompatinda pen'*.

v. 8. Al F. *avirons* ambaŭ tradukintoj sentis bezonon aldoni adjektivon: E. *pezajn*, A. *drifting*; la E. pli taŭgas al la originala komparo kun flugiloj de albatro.

v. 9-10. F. *ailé*, E. *flugila*, reeĝas F. *ailles*, E. *flugilojn* en v. 7; tiun eĥon ne donas A. *soarer* (*wings* en v. 7). La kvar adjektivoj F. *gauche*, *veule*, *comique* kaj *laid* donis malfacilaĵojn al ambaŭ tradukintoj; A. sukcesas redoni tri el ili: *meek*, *comical*, *ugly*; E. redonas ĉiujn kvar nuancojn, sed unu per verbo *hezitas*, unu per adverbo *inerte*, unu per substantivo *malbel'*, kaj nur unu per adjektivo *komika*. A. *how*..... reproduktas la esprimmanieron F. *comme*....., kiun ignoras la E. Sed A. tute ellasas F. *naguère si beau*, E. *ĵus nura bel'*, kaj enkondukas la frazon *of celestial snows*, kiu nenie aperas en la F. Pli ol aliloke evidentiĝas en tiu ĉi versduo la troa kurteco de la A. kvinjambo por traduki la F. aleksandron.

v. 11. A. aldonas la adjektivon *golden*, ne en la F.; F. *brûle-gueule* tute ne estas (E.) *kurba*; la A. ne distingas la pipspecon.

v. 12. F. *en boitant*, A. *limping*, iom lame fariĝas E. *dum la lam'*! En A. mankas redono de F. *qui volait*, E. *fluginton*.

v. 13. F. *prince*, E. *princ'*, A. *monarch*.

v. 14. E. *ĝuas* iomete libere tradukas F. *hante*, sed tion faras ankaŭ A. *rides elate*; iom lerte A. sugestas F. *se rit* per similaspekta sed signife tute alia *rides*.

v. 15. E. *buboj* ne troviĝas en la F., nek A. *crowds*; ambaŭ tamen bone akordiĝas kun la bildo.

bildojn, preskaŭ nenion propran aldonante. La angla traduko en du-tri lokoj iom grave ŝanĝas la sencon, aŭ aldonas konceptojn ne en la originalo, aŭ iun esprimon ellasas.

Formo:

La originalo estas verkita laŭ kvartroĥeaj versoj, kiuj foje permesas al si ricevi aldonitan silabon ĉe la verskomenco. Tiun ĉi formon fidele reproduktas la E. La F. aliflanke tradukas sesfoje per kvin piedoj anstataŭ kvar, kio abrupte lezas la ritmoglatecon. Kiel la originalo, tiel ankaŭ la E. rimas aabb; la F. diversmaniere. Entute la formon ne redonas F., jes redonas E.

In what distant deeps or skies
 Burnt the fire of thine eyes?
 On what wings dare he aspire?
 What the hand dare seize the fire?

And what shoulder, and what art,
 Could twist the sinews of thy heart?
 And when thy heart began to beat,
 What dread hand? and what dread feet?

What the hammer? what the chain?
 In what furnace was thy brain?
 What the anvil? what dread grasp
 Dare its deadly terrors clasp?

When the stars threw down their spears,
 And water'd heaven with their tears,
 Did he smile his work to see?
 Did he who made the Lamb make thee?

Tiger! Tiger! burning bright
 In the forests of the night,
 What immortal hand or eye
 Dare frame thy fearful symmetry?

LA TIGRO

de William Blake

Esperanta traduko de William Auld (33)

Tigro, tigro, brile brula
 En arbaro nokt-obskura,
 Forĝis kia man' eterna
 Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
 Ardis via okulhelo?
 Kia lin flugil' subtenis?
 Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno
 Por vi tordiĝis kortendeno?
 Kaj kiam pulsus batoj koraj,
 Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
 Kia forn' por cerbo via?
 Riskis kia fort' kolosa
 Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
 Kaj sur la ĉielon larmis,
 Ĉu la verko al li karis?
 Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula
 En arbaro nokt-obskura,
 Forĝus kia man' eterna
 Vin je simetri' konsterna?

LE TIGRE

par William Blake

Franca traduko de Félix Rose (34)

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
 Dans les forêts de la nuit;

Titolo :

Koincido de terminoj permesis al ambaŭ tradukintoj reeŝi la originalon.

Komentaro :

v. 1. E. redonas la aliteracion de A.

v. 2. F. redonas precizan signifon kaj ankaŭ la sonojn de A. E. aldonas la nocion *obskura*. E. *arbaro* singularas kompare kun pluralaj A. *forests* kaj F. *forêts*, sed klopodas redoni ĝeneralecon per ellaso de la artikolo.

v. 3. E. redonas A. *hand*, sed ne A. *eye*; F. redonas nenium el ambaŭ, anstataŭigante ilin per la malpli konkreta *pouvoir*. F. *immortel* precize eŝas A. *immortal*, sed superflue aldonas ankaŭ *inouï*. E. *eterna* praktike samsignifas kiel A. *immortal*.

v. 4. La kondicionalon de A. *could frame* reproduktas nek E. *forĝis* nek F. *forma*. F. *parfaite terreur* ne respondas al A. *fearful symmetry*, E. *simetri' konsterna*; A. adjektivon *fearful* tradukas F. substantivo *terreur*, A. substantivon *symmetry* tradukas F. adjektivo *parfaite* — domaĝa renversiĝo de l'signifo. Nuanceco de E. *je* estas subtila sed ne domaĝas la sencon.

v. 5. Nek E. nek F. tradukas A. *distant*. E. *fundo* kaj F. *ĉielo* singularigas pluralajn A. *deeps* kaj *skies*.

v. 6. E. *helo* ne precize samsignifas kiel A. *fire*. F. *regard* malpli konkreta ol A. *eyes*.

v. 7. E. redonas nek A. *dare* nek *aspire*. F. *osa* egalas al A. *dare*, sed substantiva F. *le vouloir* ne tute kaptas la potencon de verba A. *aspire*. E. *flugil'* denove estas singulara kompare kun plurala A. *wings*.

v. 8. Nek E. nek F. tradukas A. *dare*.

v. 9. F. *puissance* ne tradukas A. *shoulder*, E. *ŝultro*. F. *art* reeŝas A. *art*, sed oni povas trafe pravigi la E. tradukon *kompreno* en tiu ĉi kunteksto.

v. 10. Nek E. nek F. redonas A. *could*. F. *nouèrent* iom ŝanĝas la sencon de A. *twist*. E. esprimo en v. 9-10 estas iom elipsa, malpli rekta, ol A. kaj F. E. *tendeno* denove singularigas pluralan A. *sinews*.

v. 11. F. ne ripetas A. *heart*. En E. mankas nuanco de A. *began*. E. iom pleonasme al *pulsus* aldonas *batoj*.

v. 12. F. *griffes* pravas, ke la tradukinto miskomprenis la originalon tie; la A. *hand* kaj *feet* ne apartenas al la tigro, sed al la mistera, terura io aŭ iu la tigran kreinta. E. *gloraj* mistradukas la A. *dread*. Denove per E. *pied'* la tradukinto singularigas pluralan A. *feet*.

v. 15-16. A. *dare* estas tradukita de E. *riskis spiti*; F. *put* estas malpli forta. F. *mortelles* ne redonas la sencon de A. *deadly*; E. tiun nuancon ne redonas. E. *fort'* ne estas tiel preciza, kiel A. *grasp*, F. *poing*. En E. tute mankas la grava nuanco A. *clasp*. La senco de A. *dread*, F. *effrayant*, ŝanĝiĝas al E. *kolosa*.

Quel pouvoir immortel, inouï,
Forma ta parfaite terreur?

Dans quels cieux, quelles profondeurs
Brûlait le feu de ton regard?
Quel vol osa donc le vouloir?
Et quelle main saisit ce feu?

Et quelle puissance et quel art
Nouèrent les ligaments de ton coeur?
Dès ses premiers battements,
Quels pieds et griffes effrayant?

Quelle chaîne? Quel marteau?
Dans quelle fournaise était ton cerveau?
Quelle enclume? Quel poing effarant
Put gripper tes mortelles transes?

Quand les astres jetant leurs lances
Arrosèrent le ciel de pleurs,
Sourit-Il en te contemplant,
Lui qui fit l'agneau de douceur?

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
Dans les forêts de la nuit;
Quel pouvoir immortel, inouï,
Osa former ta parfaite terreur?

Ĝenerala konkludo pri Specimeno B: La franca traduko estas pli laŭvorte proksima al la originalo,

SPECIMENO C:

ANĈAR
de A. S. Puŝkin
Ruslingva originalo

V pustyne ĉahloj i skupoj,
Na poĉve, znojem raskaljonnoj,
Anĉar, kak groznyj ĉasovoj,
Stoit — odin vo vsej vselennoj.

Priroda jaĵduŝĉih stepej,
Ego v den' gneva porodila
I zelen' mertvuju vetvej
I korni jadom napoila.

Jad kaplet skvoz' ego koru,
K poludnju rastopjas' ot znoju,
I zastyvajet vveĉeru
Gustoj prozračnoju smoloju.

K nemu i ptica ne letit,
I tigr nejdet — liŝ' vihor' ĉornyj
Na drevo smerti nabëjit
I mĉitsja proĉ' uĵe tletvornyj.

I jesli tuĉa orosit,
Bluĵdaja, list ego dremuĉij,
S ego vetvej uĵ jadovit
Stekajet doĵd v pesok gorjuĉij.

No ĉeloveka ĉelovek
Poslal k anĉaru vlastnym vzgljadom,
I tot posluŝno v put' potjok
I k utru vozvratilsja s jadom.

v. 17. E. *malarmis* ne precizigas, ke temis ĝuste pri A. *spears*, F. *lances*; ĝi estas ankaŭ iom malpli definitive rezigna ol A. *threw down*. F. *participligas* per *jetant*.

v. 19. E. per *karis* parafrasas la originalon. La nuanco de A. *work*, E. *verko*, mankas en la F.

v. 20. F. fakte ne tradukas tiun ĉi verson; la tuta nuanceco mankas. F. *de douceur* ne estas motivita de la originalo.

v. 21-24. Tiu ĉi strofo ripetas la unuan strofon, kun unu grava kaj subtila diferenco: A. *could frame* apud *dare frame*; la duan redonas F. *osa former* per aldono de tuta piedo; E. donas similan sed ne saman subtilan distingon per *forĝis* apud *forĝus*.

je grava kosto de la formfidelo. Al la esperanta traduko mankas pluraj gravaj nuancoj.

Formo:

Por A. mi povis elekti inter du tradukoj: tiu de Nabokov (35) kaj tiu de Morison. Nabokov redonas la formon de la originalo, kaj reproduktas la rimskemon abab; tamen laŭsence lia traduko estas iom tro libera. Tial mi elektis tiun de Morison, kvankam la formon li tute ŝanĝis: anstataŭ la kvarjamba verso de la originalo, li uzas triakcentan verson amfibraĥan-troĥean; krom tio, li rimas nur abcb; la alternajn virajn kaj inajn versfinaĵojn de la originalo li ja redonas, sed inverse, laŭ la pli kutima angla maniero. Sed laŭsignife lia traduko estas tre proksima al la originalo. La E. traduko reproduktas la formon de la originalo, kun escepto de tio, ke la rimoj estas ĉiuj inaj.

Titolo:

Morison transliterigas la rusan vorton, sed devas ĝin klarigi per subtitolo. (Nabokov trovis la precizan anglan tradukon: *The Upas tree*.) La E. vorto koincidas kun la R., sed pro malofteco bezonis gloson, kiam la traduko aperis.

Prinjos on smertnuju smolu
 Da vetv' s uvjadŝimi listami,
 I pot po blednomu ĉelu
 Struilsja hladnymi ruĉjami;
 Prinjos — i oslabel i log
 Pod svodom ŝalaŝa na lyki,
 I umer bednyj rab u nog
 Nepobedimogo vladyki.
 A knjaz' tem jadom napital
 Svoji posluŝljivyje strely
 I s njimi gibel' razoslal
 K sosedam v ĉuĵdyje predely.

ANĈARO

de A. S. Puŝkin

Esperanta traduko de K. Kalocsay (36)

En la dezert' sterile nuda,
 El grund' bakita de sun-ardo
 Anĉar' elĝermis, staras muta.
 Ne kreskis en proksim' eĉ kardo.
 Ĝin naskis la soifa tero
 En furiozo mondmalbena,
 Kaj per veneno de kolero
 Saturis ĉiun fibron plena.
 Venen' filtriĝas tra la krusto
 En la tagmeza varmo suna,
 Ĉe l' vento de vesperkrepusko
 Koaglas je rezino bruna.
 Proksimon ĝian bird' evitas
 Kaj timas tigro. Se la sibla
 Venteg' la branĉojn ekagitas,
 Tuj plu ĝi flugas, venenkribra.
 Kaj se la nuboj de l' ĉielo
 Pluverojn sur anĉaron ŝutas,
 De la folioj kaj de l' ŝelo
 Venene tiuj teren gutas.
 Hom' homon tamen por aliro
 Komandis per rigard' rigora.
 Fidele iris tiu viro,
 Revenis kun la suk' horora.
 Portante krom rezin' fatala
 Velkintan branĉon en tornistro,
 Kun ŝvit' malvarma sur la pala
 Vizaĝ' sin trenis la servisto.
 Li falis tie tuj en sveno,
 Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto.
 Ĉe l' trono de la suvereno
 La sklavon tiel trafis morto.
 La princo ĉiujn sagojn suki
 Ordonis per venen' anĉara,
 Per arkoj tiel sendis flugi
 La morton al popol' najbara.

ANCHAR (THE POISON TREE)

by A. S. Puŝkin

Angla traduko de Walter Morison (37)

In the pale, unyielding desert,
 On soil that the sunrays curse,

Komentaro :

v. 1. La adjektivoj donis kelkan malfacilaĵon al ambaŭ tradukintoj; A. *unyielding* certagrade rekreas la personigan nuancon de R. *skupoj*; A. *pale* estas iom malforta kompare kun R. *ĉahloj*, tamen ne malbona; E. *sterile nuda* estas preskaŭ parafrazo.

v. 2. Mankas al ambaŭ tradukoj la nuanco de R. *znojem*. A. *curse* estas tre malforta parafrazo.

v. 3. E. *muta* tute mistradukas R. *groznyj*. Al E. mankas ekvivalento de R. *časovoj*. La originalo ne motivas E. *elĝermis*.

v. 4. E. traduko estas tro libera.

v. 5. A. *sun-tortured* ne troviĝas en la originalo. E. *tero* estas malpli preciza ol R. *stepej*, A. *steppe-land*.

v. 6. E. *mondmalbena* estas superflua kaj iom troiga.

v. 7-8. A. *dull* estas iom malforta kompare kun R. *mertvuju*. A. *broth* ne troviĝas en la originalo; A. *poisoned broth* estas malpli preciza ol *jadom* — samon oni povas diri pri E. *veneno de kolero*. Anstataŭ R. *vetvej* kaj *korni* (A. *leafage* kaj *roots*), E. iom strange donas *fibron*, kiu estas mistraduko.

v. 9. A. aldonas la adjektivon *thick*.

v. 10. Ambaŭ tradukoj ellasas R. *ot znoju*.

v. 11. E. *ĉe l' vento* ne troviĝas en la originalo.

v. 12. Nek A. *smooth* nek E. *bruna* estas precize sama kiel R. *gustoj*. R. *prozračnoju*, A. *transparent*, ne troviĝas en E.

v. 14-16. R. *ĉornyj*, A. *black*, fariĝas en E. *sibla*, kiu estas mistraduko. Nek A. nek E. tradukas R. *smerti*.

v. 17-18. A. aldonas adjektivon ne en la originalo: *dense*. E. redonas nek *bluĵdaja* nek *dremuĉij*.

v. 19-20. R. netransitiva *stekajet doĵd v pesok* fariĝas A. transitiva *the sand a dew receives* — tiel la bildo ion perdas. Ripetiĝo de R. *vetvej* en v. 7 kaj v. 19 ne reproduktiĝas en la tradukoj. E. *teren* perdas la esprimivon kaj precizon de R. *v pesok gorjuĉij*.

Anchár like a dreadful sentry
 Stands — sole in the universe.
 The sun-tortured, thirst-racked steppeland
 Gave it birth in a day of wrath
 And fed the dull green of its leafage
 And its roots with a poisoned broth.
 Through its bark thick poison oozes
 And, melting when midday comes,
 Congeals again in the evening
 In smooth, transparent gums.
 No bird ever lights in its branches,
 No tiger approaches the tree :
 Alone, the black storm-winds brush it
 And, venom-infected, flee.
 If a wandering rain-cloud moistens
 Its dense and unstirring leaves,
 The burning sand from its branches
 A poisonous dew receives.
 But one man to the tree sends another
 With a glance that, imperious, burns,
 And the poor slave sets out on his journey
 And at dawn with the poison returns.
 He brings with him poisonous resin
 And a branch with a few faded leaves,
 And the sweat on his pallid forehead
 In thick streams trickles and cleaves.
 The poison he brings, and fainting
 At the feet of his dread lord lies
 On the bast that the tent-floor covers.
 He utters no word, and dies.
 But the king, in that poison steeping
 His arrows with secret art,
 To his enemies sends destruction
 And death on each poisoned dart.

Ĝenerala konkludo pri Specimeno C: Bela ekzemplo de kompensoj: se nur la angla traduko repro-

★ ★ ★

Precipe Specimeno C atentigas, ke kritikoj laŭ kriterioj de maksimuma laŭvorta fideleco ne povas forpreni de la valoro de tradukoj, kiuj redonas la larĝan sencon de la originalo *kaj mem legiĝas poeziece!* Tiaj tradukoj estas pli valoraj ol tradukoj laŭvorte fidelaj, kiuj legiĝas plate kaj prozece. Kaj estas notinde, ke miaj komentarioj ĉifoje estis tute

SUBNOTOJ

- (29) Nadiron de la tradukarto eble prezentas libro "Burns in other tongues" (Burns en aliaj lingvoj), en kiu estas kolektitaj tradukoj de poemoj de la skota poeto Robert Burns en proks. 50 aliajn lingvojn. Aliflanke, Maršak en la rusa kaj Rossetti en Esperanto pruvis, ke altgradaj fideleco kaj poezieco en traduko el Burns estas atingeblaj se la tradukanto havas la necesan genion.
- (30) lok. cit. sub (19).
- (31) Ch. Baudelaire : La floroj de l' malbono. La Laguna, 1957, p. 62.

v. 21. A. *one man... another* tute ne sukcesas reprodukti la trafan apozicion de R. *ĉeloveka ĉelovek*, kiun ja atingas E. *hom' homon*.

v. 22. A. *that burns* estas pleonasma.

v. 24. R. *k utru* mankas en E.

v. 25-28. E. aldonas *en tornistro*, ne en la originalo. A. *trickles and cleaves* estas iom troiga traduko de R. *struilsja*.

v. 29-32. A. *dread* estas iom malforta traduko de R. *nepobedimogo*; E. *ĝin* ne tradukas. A. aldonas *he utters no word*, kiun ne motivas la originalo. E. *ĉe l' trono* estas tre malforta anstataŭaĵo de R. *pod svodom ŝalaŝa na lyki*; la A. *on the bast that the tentfloor covers*, kvankam pli pitoreska kaj proksima, tamen estas mistraduko kaj cetere ambigua.

v. 34. A. *with secret art* ne troviĝas en la originalo. Neniu el ambaŭ tradukoj donas ekvivalenton de R. *poslušlĵivye*.

v. 36. A. *to his enemies* estas multe tro kurta, kaj cetere senkolora kaj maltrafa, parafrazo de R. *k sosedam v ĉuĵdyje predely*.

duktus la formon de la originalo, se nur la esperanta traduko estus pli preciza, malpli parafraza!

kritikaj; ne estis mia celo elnombri la belaĵojn de la diversaj kaj diverslingvaj tradukoj — cetere, ilin rimarkos mem la atenta leganto-poeziamanto. Mia celo estis, indiki la gravan rolon, kiun Esperanto jam komencis ludi, kaj iom post iom pli amplekse ludos, kiel pontlingvo, kaj tute speciale kiel literatura pontlingvo, inter la popoloj de la mondo.

- (32) Roy Campbell : Poems of Baudelaire. Londono, 1952, p. 6.
- (33) Angla Antologio I. Roterdamo, 1957, p. 174.
- (34) Felix Rose : Les 50 meilleurs poèmes anglais. Glasgovo, 1956, p. 35.
- (35) Pushkin, Lermontov, Tyutchev : Poems. Trad. Vladimir Nabokov. Londono, 1947, p. 10-11.
- (36) Revuo Esperanto. Roterdamo, 1956, p. 118.
- (37) Pushkin's poems. Trad. Walter Morison. Londono, 1945, p. 46-47.

Ĉefurbo de nia Kontinento

Ĉu la memoroj de vizititaj lokoj forviŝas unu la alian, aŭ ĉu ili deponiĝas en netaj tavoloj, kiel la memoro de amataj vizaĝoj? Kiu faktoro, kiu karakterizo eternigas iun urbon en nia animo? Ĉu la emocioj de la vizito, ĉu la feliĉoj aŭ malĝojoj de tiuj horoj?

Ni ĉiuj iros al Bruselo. Se ni jam estis tie, ni reiros, senpovaj kontraŭ la alvoko de la beleco. Ni vivos en ĝi unu semajnon: ni ĝuos ĝin en ĉiu detalo. Ni forlasos ĝin. Poste, kio restos en nia memoro pri Bruselo, pri ĝia Kongreso? Kion ĝi donos al ni por la resto de niaj tagoj?


Ĉu la ĝojon de viaj enloĝantoj aŭ la kupran verdon de viaj tegmentoj, mia blonda Kopenhago? Ĉu la sonon de la itala lingvo aŭ la ombron de viaj pendantaj turoj, Bolonjo? Ĉu la lumon kaj la Mediteraneon de vi, latina Marseille? Ĉu la rebrilojn en la Rejno de la Mainza katedralo aŭ la koron de Chopin en Varsovio?

Jes, ĉion ĉi Bruselo donos al ni kaj multon alian. Ĉio, kio en la mondo parolas pri eleganteco kaj harmonio, ĉio kio superis la limojn de unu lando kaj fariĝis universala, ĉio tio estas kosmopolita kiel Bruselo. Vi povas nomi ĝin per la plej diversaj nomoj, sed daŭre restos la esenco: homoj, kiuj mortis kiel nacioj kaj renaskiĝis kiel esprimantoj de la tuta homaro. Bruselo estas marego, en kiu la skoloj, la jarcentoj, la historio miksiĝas, refandiĝas, harmoniĝas en unu sola tuto.

Vi komprenos tion, kiam vi troviĝos sur la Granda Placo. Vi, homo, sentos vin malgranda meze de tiom da beleco. La oraj konstruaĵoj, eĥo de 52 profesioj, parolos al vi pri la tempo de la Gildoj, la sola civilizo bazita ne sur la apologio de la laboro, sed sur la laboro mem.

La lokoj estas vivantaj, havas animon. Kelkfoje ili starigas demandojn. Kelkfoje ili respondecas al ili. Jen ekzemplo. Iun tagon antaŭ dek jaroj mi silente rigardadis de la balustrado la ĉerkon de Napoleono en Parizo. Ankaŭ tiam okaze de Kongreso. Voĉo malantaŭ mi murmuris: "Ĉu estis vera gloro?". Dum jaroj mi vane serĉis la respondon tra la tuta Eŭropo. Mi trovis ĝin en Bruselo, en vilaĝo apud ĝi nomata Waterloo.

Bruselo respondas al niaj demandoj, ĝi donas al ni la senton de senlima libereco. Post la reveno al niaj hejmoj,



longe en niaj sopiroj ni "rajdos tra la Granda Placo aŭ preter la Kortuma Palaco", kiel Erasmo. Korpe aŭ spirite, ni revenos al Bruselo. G. C. Fighiera

ANTAŬKONGRESO

Antaŭ la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1960-a, okazos en Arnhem (Nederlando) Antaŭkongresa Renkontiĝo de la 27-a ĝis la 30 de julio.

Provizora programo de ĉi tiu oficiala antaŭkongreso enhavas ekskursojn, oficialan akcepton, distran kaj kulturan vesperojn, k.t.p.

Bruselo estas facile atingebla de Arnhem — per trajno ekz. en 4 horoj. Oni povas peti informojn ĉe la sekretario H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem.

AL NIAJ LEGANTOJ!

Je la fino de la Zamenhof-jaro la redakcio uzas la okazon danki al ĉiuj, kiuj iamaniere kontribuis al nia revuo en la daŭro de la jaro 1959, kaj ni deziras por ĉiuj niaj legantoj sukcesplenan novan laborjaron.

Kirsten Zacho

BELGUJO — LEUVEN

L.E.A., sekcio de Flandra Ligo, pretigas esperantan tekston por enŝovi en la prospekto pri sia urbo.

Bonvolu jam nun peti ĉi prospekton por montri al la urbestro vian intereson kaj samtempe por kunlabori al akceptigo de aliaj projektoj planitaj okaze de la internacia kongreso de 1960 en Bruselo.

Leuven situante nur je 26 km. de la ĉefurbo, estas fama universitata urbo kun 37.000 enloĝantoj kaj posedas belegajn gotikajn, renesancajn kaj barokajn konstruaĵojn apud aliaj artaj vidindaĵoj.

Ekzistas du prospektoj: unu pri la promenadoj tra la urbo kaj alia kun fotobildoj de diversaj konstruaĵoj.

Adreso: Toeristisch Bureau, Stadhuis, Grote Markt, Leuven-Belgie.

A. M.

Korespondadreso:

Naamse straat, 80, Leuven.

La silka vojo de Esperanto

La reciproka aprezo de orientaj kaj okcidentaj kulturoj ne estas nova afero. Ekde pluraj jarcentoj la kultura interŝanĝo inter oriento kaj okcidento — konkrete ni diru inter Azio kaj Eŭropo — perfekte funkcias, sen specialaj komisionoj. Eĉ sen aparta konscio, ke tiu interŝanĝo kontribuas al la universaleco de la kulturo.

La kulturplantoj de la antikva Mezopotamio etendiĝis egale orienten kaj okcidenten. La dombestoj de la antikva Egiptujo aklimatiĝis ĉe ĉiuj popoloj, barbaraj kaj civilizitaj.

La spicaĵoj el Hindujo kaj Indonezio trovis sian vojon tre frue al la kuirejo de la eŭropanoj, same kiel el Eŭropo disvastiĝis tra la tuta oriento la uzo de la amerikodevena tabako. Silko kaj porcelanaĵoj el Ĉinujo estis portataj okcidenten de longaj karavanoj, kiuj reiradis ŝarĝitaj per eŭropaj manfaraĵoj.

La presarto kaj la pulvo filtriĝis el oriento okcidenten preskaŭ kiel ludilo, venkante la barojn de la distanco, por maturiĝi en Eŭropo kaj reiri kiel potencaj klerigilo kaj batalilo respektive.

Ankaŭ spiritaj trezoroj, kiel la rakontoj de la 1.001 noktoj, kaj kiel la grandaj religiaj movadoj, ne konis barojn inter la kontinentoj.

Ĉiuj tiuj bienoj, materiaj kaj spiritaj, fluadis ambaŭdirekten dum multaj jarcentoj seninterrompe.

Laŭ unu el la trezoroj portataj de la karavanoj, la vojo liganta okcidenton kaj orienton estis nomata la „silka vojo”. Nur aventuremaj kaj kuraĝaj


komercistoj povis entrepreni tiajn vojaĝojn, ĉar ili estis tre nesekuraj, kaj daŭris kutime plurajn jarojn. Ni memoru ke Marko Polo forestis 17-jarojn dum sia vojaĝo.

Por ebligi tiajn vojaĝojn, kaj por laŭeble sekurigi la vivon kaj la havaĵon de la vojaĝantoj, en urboj, vilaĝoj kaj apudvoje, je distanco de tagmarŝo, oni konstruis karavanejojn — karavanseraĵojn — kie ripozo, provizo de nutraĵo kaj akvo, kaj eventuale eĉ freŝaj kameloj kaj ĉevaloj atendis la vojaĝantojn.

Hodiaŭ, kiam la varoj estas transportataj per ŝipegoj kaj vagonaroj, kaj rapidaj aviadiloj trafikas inter la grandurboj de ĉiuj kontinentoj, oni povus pensi ke la „silka vojo” malaperis, kaj kun ĝi la karavanseraĵoj formortis. Tamen, tio estas nur ŝajna vero.

Hodiaŭ pli ol iam ajn, ne nur la transporto de varoj kaj la rapida vojaĝo estas grava, sed estas esenca la kontakto inter la homoj de diversaj kulturaj medioj, ilia reciproka interkompreniĝado kaj reciproka diskonigado de apartaj kulturaj havaĵoj. Pro tio, neniam la homoj vojaĝadis kaj korespondadis tiom, kiom en nia tempo. La mondo iom post iom kreas sian unuecon. Al tio strebas politikistoj, sciencistoj, komercistoj, artistoj, sportistoj kaj turistoj.

En antikvaj tempoj la lingva problemo, eĉ se ĝi ekzistis, ne estis tre akuta. La interŝanĝo de varoj ne bezonis multajn vortojn, kaj tiuj, kiuj havis la mision transdoni iun kulturan havaĵon, vojaĝadis



La mapo montras la "SILKAN VOJON DE ESPERANTO" kun ĝiaj diversaj eblaj alternativoj. La dika linio montras la "ĉefvojon", la malpli dikaj la "duarangajn". El tiuj vojoj kaj la "karavanhaltejoj" sur ĝi, disbranĉiĝos poste multaj novaj vojoj, kiel la sango irigacias la tutan korpon pere de arterioj disbranĉiĝantaj ĝis la plej etaj kapilaroj. Por ke la "silka vojo" povu ekfunkcii, minimume 20 karavanhaltejoj — 20 novaj societoj — estas bezonataj. Ĉu ni baldaŭ havos ilin?

tiel malrapide, ke ili povis lerni la lingvon de la popolo en kiu ili agadis.

Hodiaŭ la interkompreniĝado estas esenca.

Al vojaĝanto fariĝis ĉiutaga vidaĵo la doganisto, kiu malgraŭ la kono de kelkaj lingvoj ne interkompreniĝas kun la multnaciaj vojaĝantoj. Ni ofte vidas turiston, kiu el sia praktika vortareto klopodas deĉifri la frazon "kie estas la poŝtoŭicejo?" aŭ „kiom kostas tio?”.

Sed tio evidente por la hodiaŭaj bezonoj malsufiĉas.

Pro tio, por povi komunikiĝi kun alilandanoj, multaj homoj per laŭdinda fortostreĉo klopodas, kaj eĉ sukcesas lerni du, tri aŭ kvar lingvojn. Aziano, kiu venas al Eŭropo kun la kono de du aŭ tri ĉeflingvoj, povas esperi esti komprenata de kelkaj kleruloj ĉiuloke.

Sed kiajn esperojn havas la eŭropano — aŭ aziano — vojaĝanta tra Azio? Kiu entreprenos la taskon lerni du-tri aziajn lingvojn? Kaj eĉ se iu tion farus, kiujn lingvojn li elektus? Por kompreni la gravecon de la problemo, jen resuma bildo pri la lingva problemo en Azio.

En Azio estas parolataj pluraj miloj da lingvoj kaj dialektoj, el kiuj multaj ankoraŭ estas nek pristuditaj nek klasigitaj. Laŭ la raporto de UNESKO pri baza edukado (1953), lingvistoj klopodis klasigi la lingvajn familiojn de Azio jene:

Indo-eŭropaj: greka, armena (3 ĉefdialektoj), indo-irana, irana (persa aŭ pahlevi, kaspia kun 5 dialektoj, kurda kun 3 dialektoj, pamira kun ĉ. 8 ĉefdialektoj), afgana aŭ paŝtu (2 variantoj), baluĉa (2 dial.), oseta (pluraj dial.).

Hindaj lingvoj: Marathi, gudĵerati, Panĝabi, Raĝasthani, okcidenta hindi, orienta hindi, orija, bihari, bengali.

Dravidaj lingvoj: Tamil, telugu, malajalam, kanari, brahui, gondi, bhil, kui, kurukh, kaj multaj dialektoj.

Semitaj lingvoj: Araba (ĉ. 13 ĉefdialektoj), hebrea.

Finn-Ugoraj lingvoj: Samojeda (5 ĉeflingvoj kun ĉ. 40 dial.).

Turko-tataraj aŭ altaĵaj lingvoj: Turka, kirgiza, uzbeka, azerbajĝana, kun pluaj 23 ĉeflingvoj, jakuta, mongola (ĉ. 20 ĉefdialektoj).

Tunguz-Manĉu lingvoj: Tunguza, manĉua (22 ĉefdial.).

Indo-ĉinaj aŭ sino-tibetaj lingvoj: ĉina (4 ĉefdialektoj), tai-siama (multnombraj dial.), tibet-birma (tibeta kun ĉ. 30 dial., birma kun 2 ĉefgrupoj, bodo-naga-kaĉin kun ĉ. 50 lingvoj, lolo kun 6 lingvoj), hiperborea (ĉukĉi, korjak, jukagir, kaniĉadal), jenisej-ostjak-kotain.

Munda lingvoj en Himalaja kaj Ĉota-Nagpur en Hindujo, kun pli ol 30 dialektoj.

Mon-Khmer lingvoj: Kambodia, anamita kaj aliaj 20 lingvoj kaj dialektoj.

Giljak.

Ainu.

Japana.

Korea.

Tiuj ĉi estas nur la ĉefaj lingvaj grupoj. Konata estas tamen la fakto, ke en Hindujo oni parolas ĉ. 60 lingvojn, en Ĉinujo 80 kaj en Birmo 120, ne kalkulante la diversajn dialektojn.

Same estas konate, ke en Ĉinujo ĉ. 300 milionoj da homoj komprenas la pekingan dialekton, ke en Hindujo almenaŭ triono de la enloĝantoj komprenas hindi, kaj ke Birmo adoptis unu el siaj lingvoj kiel oficiala.

En la aziaj landoj, kiuj antaŭa estis kolonioj de iu eŭropa potenco, aŭ estis aŭ estas sub influo de iu nacio, politika aŭ kultura, tie tiu eŭropa lingvo — angla, franca, germana, nederlanda, rusa — estas instruata almenaŭ en la mezlernejo, kaj la universitata instruado plejofte okazas en tiu lingvo.

Kontraŭe, la ĝenerala tendenco estas en Azio — kaj en la mondo — ke la elementa instruado okazu en la gepatra lingvo de la infanoj.

Tiel ekestas la fenomeno, ke membro de iu hindu tribo ricevas la elementan instruon en sia propra lingvo, sed la mezlernejan instruadon en la lingvo de sia ŝtato, unu el la 14 oficialaj lingvoj de Hindujo, kiun li nepre devas koni. Jam en la mezlernejo li lernas ankaŭ hindi kaj la anglan, inter kiuj estas nun rivaleco por la loko de unika oficiala lingvo en la estonto.

Estas evidente, ke en tiaj cirkonstancoj la hindaj kleruloj, kaj simila situacio estas en multaj aliaj aziaj landoj, pasigas grandan parton de sia disponebla tempo por lernado de pluraj malfacilaj lingvoj. Tiun tempon ili kompreneble mankumas ĉe la ĝenerala kaj faka instruigo.

Vidante tiun ĉi komplikitan lingvan panoramon de Azio, ni facile povas kompreni, ke la lingva diverseco estas handikapo kiu aldoniĝas al aliaj malfacilaĵoj por la progreso de la aziaj popoloj.

Fariĝas evidenta la fakto, ke komuna lingvo por Azio ne estas ia lukso, sed urĝega bezono. Kaj el la pluraj bezonoj, ĝi estas tiu, kies solvo estas plej ebla. Ni ne povas proponi, ke oni glatigu la Himalajan montĉenon, nek ke oni subite ŝanĝu la pasintecon, aŭ la religiajn kaj filozofiajn konceptojn de tuta kontinento. Sed jes ni povas imagi la eblecon, ke la popoloj iun baldaŭan tagon interkonsentu elekti iun lingvon, por la reciproka interkompreniĝado. Por tiu momento ni devas esti pretaj, por montri al la serĉantoj la vojon al la Internacia Lingvo.

Kiel pretiĝi por tiu momento?

La preparoj estas ĝeneralaj, kiuj koncernas la progresigon de Esperanto en la tuta mondo, kaj la specialaj, kiuj koncernas Azion. Pri la unua jam tre efike kaj celkonscie strebadas la koncernaj organoj de UEA, nuntempe pli energie kaj pli sukcese ol iam ajn antaŭe. Koncerne la preparojn en la azia kontinento estas necese diri iom pli.

Tre forta kaj el ĉiu aspekto laŭdinda movado ekzistas en Japanujo. Nova sed vigora en Vietnamio, Ĉinio kaj Indonezio. Nova kaj baraktanta

kun malfacilaĵoj, en Hindujo kaj Nepalo. Malnova sed stagnanta en Israelo. Krome esperantistoj troviĝas en Turkujo, Irano, Cejlono, Kuvajto, Koreo, Libano kaj Tajlando.

Nia tasko estas fortigi la movadon en landoj kie ĝi jam ekzistas, krei ĝin tie, kie nur opaj izoluloj troviĝas, aŭ eĉ kie neniu esperantisto ankoraŭ loĝas.

Por povi stimuli la ekeston kaj fortiĝon de la movado en Azio, ne sufiĉas laboro de informantoj kaj instruantoj, ĉar iliaj klopodoj estas vanaj se ni ne povas samtempe al la popoloj de tiuj landoj elmontri la utilecon de Esperanto kaj ĝian praktikan aplikadon.

Estas malfacile kreskigi kaj vivteni societon en iu azia urbo, al kiu dum jaroj ne alvenas eĉ unu lerta esperantisto eksterlanda, kaj en kiu loĝas eĉ ne unu lerta gvidanto.

Nia nepra bezono estas krei viglan kulturan interŝanĝon kun la ekzistantaj kaj la ekestantaj societoj kaj asocioj.

La Komisiono por reciproka aprezo de orientaj kaj okcidentaj kulturaj valoroj de UEA antaŭvidas plurajn iniciatojn por stimuli tian interŝanĝon: eldonadon de libroj, publikigon de artikoloj, organizon de seminarioj kaj interŝanĝon de prelegistoj.

En la nuna stato de aferoj, tiu ĉi lasta iniciato — interŝanĝo de prelegistoj — havas eksterordinaran gravecon.

Kompetentaj prelegistoj, kaj samtempe perfektaj esperantistoj, tiel ke ili imponu kaj al esperantista kaj al neesperantista aŭdantaro, el Eŭropo ekveturu orienten, prelegadu en ĉiuj urboj kie tio eblas, kunvenigu la esperantistojn, helpu ilin en iliaj organizaj problemoj, kaj stimulu ilian progresadon. Similaj kleraj prelegantoj el la foraj aziaj landoj ekveturu okcidenten, kaj donu novajn injekciojn al societoj kaj opuloj en Azio kaj en Eŭropo. Ĉie, en ĉiuj landoj tiaj injekcioj estas bezonataj!

Sed ni rekonu, ke la vojaĝo al tiel grandaj distancoj estas ege multekosta. Tio validas precipe nun, kiam inter Sofia kaj Delhi ekzistas eĉ ne unu Esperanto-grupo. La distancoj inter unu kaj alia societo estas tro grandaj, kaj ili ankoraŭ ne estas sufiĉe fortaj por povi subvencii kaj gastigi vizi-

tantojn.

Alivorte, la „silka vojo”, malaparinta laŭŝajne pro la interŝanĝo de varoj per ŝipo kaj vojaĝado per aviadilo, devas esti rekonstruita. Ĉifoje ne pro silko nek pro spicoj, sed por reciproka donacado de niaj kulturaj valoroj, surbaze de amikeco kaj egaleco, helpe de neŭtrala komuna lingvo. Jen la nova senco de la silka vojo, la „silka vojo de Esperanto”.

Sed ni ne forgesu, ke por la sekureco de la vojaĝantoj karavanhaltejoj troviĝis survoje post ĉiu tagmarŝo. Ankaŭ ilin ni nepre devas rekonstrui, ĉar sen ili la silka vojo ne povas funkcii.


Nia unua zorgo devas esti krei Esperanto-societojn en ĉiuj landoj, laŭeble plej dense sur la „silka vojo de Esperanto”, kiu ligas orienton kun okcidento. Tiel, ke japana, ĉina, vietnama, hinda aŭ indonezia preleganto povu ekveturi tra tuta Azio kaj Eŭropo, farante sian vojaĝon en mallongaj etapoj, vivtenante sin pere de siaj prelegoj, publikaj kaj en rondo de esperantistoj. Same povos fari ankaŭ eŭropaj prelegantoj, en la kontraŭan direkton.

Tio estos konvene ne nur por la prelegantoj. Sed ankaŭ kaj precipe por la societoj, kiuj tiel estos en konstanta kontakto kun lertaj diverslandaj prelegantoj kaj iliaj stimiligaj ideoj. Ili havos en siaj manoj ankaŭ enviindan batalilon por konvinki siajn samurbanojn pri la utileco de Esperanto.

Kaj fine ĝi estos la bazo de la disvastigo de Esperanto en la landoj tra kiuj pasos la vojaĝantoj, kaj por tuta Azio ĝenerale.

Ĉar eĉ se teorie ni povas imagi la „silkan vojon de Esperanto” kiel unu linion, praktike ĝi estos linio kun multaj alternativoj kaj deirvojoj. Iom post iom, en la posta stadio de evoluo, ĝi estos kiel dorsa spino de densa reto de vojoj kaj vojetoj, tra kiu nia spirita „varo” fluos en ambaŭ direktojn.

Kiel karavanhaltejoj ne povas vivteni sin se karavanoj ne pasas, tiel ankaŭ la karavanvojoj ne povas esti uzataj, se ne ekzistas bone ekipitaj haltejoj sur ĝi. Tial, energie kaj senhezite ni devas aliri al la kreo de aro da societoj en Azio, samtempe kun la stimulo de vojaĝantaj prelegistoj kaj aliaj altvaloraj personoj, por entrepreni transkontinentajn vojaĝojn.



Oficiala transdono de la ŝipo "Zamenhof"

Je la 6-a de novembro 1959 okazis en la ŝipfarejo "Split" en Jugoslavio la oficiala transdono de la tie konstruita ŝipo "Zamenhof" al la Pola Oceana Linio, kiu ĝin mendis. Dum tiu solenaĵo faris paroladon en Esperanto S-ro Aleksander Hrستیć, ekonomisto kaj delegito de U.E.A. en Split. Li esprimis i.a. la penson ke, same kiel Zamenhof per sia lingvo Esperanto ligis la homojn de ĉiuj kontinentoj, same tiel la bela nova ŝipo ligos ĉiujn kontinentojn dum siaj grandaj transoceanaj veturoj kaj konigu al ĉiuj popoloj la nomon de la granda homo Zamenhof.

Tra la Mondo

Anglujo

En Londono la 25-an de Novembro, 1959 fondiĝis la "Esperanta Studo-Klubo" por serioza studado de internaciaj sciencaj kaj kulturaj problemoj. La provizora estraro estas Prof. d-ro I. Lapenna, s-ro N. R. Smith, B. Sc., s-ro Ockey.

★

En Manchester okaze de la Zamenhof-jaro la esperantistoj kun granda sukceso okazigis ampleksan kaj belarangitan ekspozicion en la ĉefbiblioteko. La vicurbestro malfermis ĝin, kaj pli ol 3000 homoj en- kaj eksterlandaj ĝin vizitis. Post la ekspozicio stariĝis 3 kursoj, kaj ankaŭ en la popollernejo Esperanto estas instruata.



Aŭstrio

De la 3-a ĝis la 5-a de oktobro okazis en Graz Zamenhofjubilea festo, bonege aranĝita de la s-roj Hofrat, Karl Friedl kaj Josef Eder. En la urbdomo la delegitoj kuniĝis por oficiala akcepto de la urbestro prof. d-ro Eduard Speck.



★

Sur la iama hotelo Hamerand, Vieno, estis en 1924 fiksita Zamenhof-Memortabulo pro tio, ke d-ro Zamenhof dufoje loĝis tie. Post la okupado de Aŭstrio oni en 1938 detruis ĝin. La jubilea jaro donis al s-ro konsilisto Hugo Steiner la ideon kune kun aliaj esperantistoj ree dediĉi al la memoro de d-ro Zamenhof indan tabulon. Okazis festo, kaj la s-ro urbestro (lerta esperantisto) Franz Jonas inaŭguris la tabulon. Sekvis parolado de s-ro distriktestro Reg. Kons. Bartl kaj aliaj eminentuloj.

Belgujo


La Flandra Sekcio de la Nacia Radio-Instituto elsendis la 29-an de septembro "Skoltan duonhoron". Dum tiu elsendo la prezidanto de "S.E.L." estis intervjuita de la gvidanto de tiu skolta duonhoro.

Brazilo

XVIA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Inter la 18-a kaj 25-a de Oktobro okazis en Salvador, ĉefurbo de Ŝtato Bahia, la XVIA Brazila Kongreso de Esperanto. Ĝi ricevis valoran apogon flanke de la Rektoro de la Universitato, de la Ŝtata deputitaro kaj de la urbestro.

La festparolado de la Malferma Kunsido estis farita de Ĵurnalisto Jorge Calmon, tiu de la Ferma Kunsido de la Rektoro de Universitato de Bahia, Prof. Edgard Santos. Specialan mesaĝon sendis Prof. Pedro Calmon, Rektoro de Universitato de Brazilo.



Solena malferma kunsido en la aŭlo de la Universitato de Bahia.

De maldekstre-dekstren: Dr. José Siquara da Rocha, Prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio; Prof. D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo; Supera Ĵuĝisto José Jeronymo de Albuquerque, Prezidanto de la Kongreso; Rektoro Prof. D-ro Edgard Santos, Honora Prezidanto; Reprezentanto de la Guberniestro; Reprezentanto de la Urbestro; Oficiala Oratoro, D-ro Jorge Calmon; Parolanto de la Ligo, Prof. Manoel Borges dos Santos.

Danlando

La japana direktoro de "Oomoto" s-ro Eizo Ito la 5-an de novembro en la societo de U.N. en Kopenhago faris prelegon kun kolorlumbildoj pri Japanujo kaj pri la atombombo. La prelego, kiun oni tradukis danlingven, kaŭzis grandan atenton de la ĉeestantoj, kaj post ĝi multaj demandis pri la Internacia Lingvo kaj petis informon pri ĝi.

Finnlando

Tri blinduloj en Helsinki decidis studi la licean kurson por ekzameniĝi kaj atingi ateston pri matureco. Ĉar ili jam lernis Esperanton, ili petis promeson ekzameniĝi en Esperanto anstataŭ en latina lingvo. La instrua administracio petis, ke s-ro Vilho

Setälä — membro de la Akademio de Esperanto — ellaboru planon por adekvata kurso. La administracio la 28-an de oktobro ĉijare aprobis la studplanon sub la kondiĉo, ke la ekzamenon efektivigu instruisto de Esperanto, aprobita de la Akademio de Esperanto. La rektoro en la lernejo, kie la blinduloj ekzameniĝos, s-ro Kauko Salmenkallio, favore subtenis la peton.

Francujo

"Le Monde des Philatélistes" (Parizo) famkonata gazeto pri poŝtmarkoj, aperigas nun rubrikon en Esperanto; tiu rubriko en kiu oni ricevas informojn pri la noveldonitaj francaj poŝtmarkoj, estas zorgata de nia delegito en Parizo J. A. Rousseau.

Germanujo

La germana entrepreno "Reise- und Verkehrsverlag Stuttgart" eldonas grandan plurlingvan internacian gvidlibron por tendumantoj en Eŭropo. Ĝi decidis presigi en la eldono 1960 de tiu libro la tabelon de klarigoj ankaŭ en Esperanto.

Hindujo


ETAJ NOVAĴOJ EL NEW DELHI

Pro la diverseco de mia laboro, kiu okupas mian tutan tempon, mi informas nur koncize pri miaj nuntempaj kursoj. Mi komencis ilin jam en aŭgusto, kaj nun kvar rondetoj funkcias.

Unu grupo, la plej granda, lernas en la biblioteko de Delhi, la alia lernas en New Delhi, unu en Y.W.C.A., unu en la fraŭlina salono de mia hotelo kaj unu en ĝia akceptsaloneto, ĉar ne estas eble trovi ĉambron por publika kurso en tiu ĉi urbo bedaŭrinde. Ĉiuloke la gelernantoj tre atentigas kaj diligente lernas.

La progresintoj aktive preparas la Zamenhofan feston, kiu okazos la 15-an de decembro en la biblioteko de Delhi. Kiam vi legos tiujn ĉi liniojn, ĝi do jam estos okazinta, espereble kun sukceso.

Je tiu okazo mi, oficiale, transdonos al la biblioteka direktoro la librojn kaj gazetojn, entute pli ol 200, kiujn ni ricevis de 38 personoj aŭ asocioj el 19 diversaj landoj. Plej varme mi



dankas la donacintojn, kiuj tiel kuraĝigis la novulojn kaj helpis min diskonigi Esperanton en tiu vasta lando.

Al tio ankaŭ ĉiam helpas gratuloj kaj salutoj, direktitaj al jena adreso: "Esperanto Promotion Group", Delhi Public Library, Delhi, Hindujo.


Mi persone devas peti pardonon pro mia tro longa ne memvola silentado al miaj geamikoj diverslandaj. Al ili mi sendas la plej korajn bondezirojn okaze de la Nova Jaro, kaj varmajn salutojn.

New Delhi, la 8-an de novembro 1959.

M. Haudebine,
Cseh-Instruistino el Parizo,
c/o Ambassade de France,
2 Aurangzeb Road,
New Delhi, Hindujo.

Hispanujo

Okaze de la Zamenhof-jaro estas fondita en Barcelona la "Hispana Esperanto-Junulara Sekcio". La prezidanto s-ro Salvador Aragay estas ankaŭ redaktoro de ĝia bulteno, kiu aperas dufoje monate. La bildo montras la anojn de H.E.I.S. okaze de la inaŭguro de la nova "Placo de d-ro Zamenhof" en la urbo Tarrasa.



★

Okaze de la Zamenhof-jaro okazis en Sabadell grandskala poresperanta laboro, kiu kulminis per nomiĝo de centra strato laŭ la nomo de d-ro Zamenhof. Dum la inaŭguro paroladis d-ro Rafael Herrero, prez. de Hispana Esperanto-Federacio, kaj s-ro urb-konsilanto d-ro Argemi, delegito por kulturo en Sabadell.



★

La Esperanto-klubo "Nordo" de Oviedo prezentis de la 20-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro tutmondan gazetaran ekspozicion en tiu urbo. Venis el 59 landoj miloj da gazetoj, ĵurnaloj kaj revuoj, kiuj estis prezentitaj en kvin salonoj. La solenan malfermon ĉeestis la aŭtoritatuloj de la urbo, kaj la prez. de la klubo s-ro Luis Garcia Fernandez estis intervjuita de

ĵurnalistoj kaj parolis en la radio dufoje pri la ekspozicio, kiu estis unu el la plej gravaj okazintaĵoj ĝis nun aranĝitaj en Hispanujo. Pli ol 40.000 personoj ĝin vizitis.

★



Zamenhof-busto skulptita de s-ro Lluís Domenech el Barcelona kaj prezentita en ekspozicio en Gracia.

★

Indonezio

La Indonezia Esperanto-Asocio festos la centjaran datrevenon de d-ro Zamenhof de la 1-a ĝis la 7-a de decembro 1959 per la unua kongreso de indoneziaj esperantistoj en la urbo Bandung.

Italujo

Sub la alta patroneco de la ŝtata prezidanto de Italujo, s-ro Giovanni Gronchi, okazis de la 12a — 24a de septembro ĉijare en Firenze la Itala Esperanto-Kongreso. Al la honora komitato de la kongreso apartenis i.a.: la prez. de la senato, s-ro C. Merzagora, la prez. de la ĉambro por internaj aferoj prof. G. Leone, la ministro por publika instruado, senatoro prof. G. Medici, la ministro por eksteraj aferoj prof. G. Pella, kaj pluraj ministroj kaj prezidantoj. Dum la inaŭguro reprezentantoj el 19 landoj salutis la kongreson. La prez. de U.E.A., prof. d-ro G. Canuto, faris la festparoladon itallingvan kaj prezentis perfektan karakterizon de la lingvo internacia. La urbestro okazigis oficialan akcepton, kaj en la universitato estis "Vespere honore al Zamenhof".

Nederlando

La Internacia Katolika Informejo ekzistas dum 25 jaroj. Ĝi fondiĝis la 30-an de junio 1934. Dum la pasintaj 25 jaroj pli ol 2500 personoj el 69 landoj respondis al tiu "ĉiama anonco" de

I.K.I. kaj petis informojn. Ek de 1936 la informpetantoj ricevas la revueton "Vojo - Vero - Vivo".

Norvegujo

La eldonejo de Dreyer, Oslo, laŭ propono de Norvega Esperantista Ligo, decidis eldoni la libron de Edmond Privat — "Vivo de Zamenhof" en norvega lingvo — en Riksmål (t.e. korekta ŝtata lingvo). Kondiĉo por la eldono estis, ke oni antaŭe havas 600 antaŭmendojn. Tiun nombron oni atingis.

Pollando

La polaj fervojoj je la unua fojo eldonis veturplanon ankaŭ esperantlingve.

Svedujo

La 30-an de septembro 1959 okazis en Stokholmo publika memorsoleno pri d-ro Zamenhof. Paroladojn faris s-roj senatano-rektoro E. Dahl, univ. prof. B. Collinder, eks-prezidanto de U.E.A. E. Malmgren kaj s-ro Solveig Carrfors. S-ro Morariu faris provlecionon esperantan kaj gvidas nun kurson por komencantoj, kiuj aliĝis post la sukcesa jubilea festo. La japana redaktoro s-ro E. Ito estis intervjuita, kaj cetere la ĉefurbaj gazetoj favore raportis bilde kaj vorte pri la jubilea aranĝo. Ĉeestis 300 personoj.

★

En 1960 Eldona Societo Esperanto eldonos kolekton de rakontoj de la hinda nobelpremiita aŭtoro Rabindranath Tagore. La libro, kiu estas tradukita al Esperanto el la originalo en bengala lingvo de la hinda Esperantoveterano Lakshmiswar Sinha, estos bele bindita kaj ilustrita kaj aperos sub aŭspicioj de UEA en la serio Oriento-Okcidento.

LA SURROKA URBO ATENDAS VIN!

La 29-a Normanda Esperanto-Kongreso okazos en DOMFRONT (Orne - Francujo) la 14-an kaj 15-an de Majo 1960. La Loka Kongresa Komitato jam de nun kore invitas eksterlandajn gesamideanojn al partoprenado. Tiu manifestacio certe estos grava antaŭenpaŝo por nia afero en Suda Normandio. Ĉiujn indikojn pri aliĝo, gastigado, ktp, petu de la prezidanto de la ĵus starigita grupo: S-ro G. VERON, UEA-Delegito, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne) Francujo.

KOREKTO

S-ro Eugeno Mathowski informas, ke de nacieco li estas ruso — kaj ne ukrainano kiel erare informite en la citita antologio.

En la novembra numero ni bedaŭrinde sur paĝo 193 skribis sub la rubriko Israelo "Veterano". Ni petas vin legi "Vegetarano". — Pardonon.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov

Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

LA ZAMENHOF-JARO :

komenciĝo de nova epoko por la Esperantista junularo.

En la jaro 1959, kara al ni Esperantistoj kiel la Zamenhofa Jaro, la 15-a Internacia Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okazis en unu el la plej belaj urboj de la naskiĝlando de Esperanto, en Gdańsk. Ĉiuj junaj geamikoj, kiuj havis okazon ĉeesti tiun unikan manifestacion de la Esperanto-Junularo, sentis la specialan spiriton, kiu regis en la kongreso. Multaj amikecoj naskiĝis refoje inter la diverslandaj partoprenintoj kaj multaj certe pli kaj pli konvinkiĝis pri la taŭgeco de Esperanto por la solvado de la lingva problemo inter la junularo de la mondo, sed ili same vidis, ke ni devas ankoraŭ multe streĉi niajn fortojn por ankoraŭ pli sukcese prezenti nian internacian lingvon al la junularo de la mondo. Organizinto de tiu kongreso estis Pola Esperanto-Junularo sub la gvido de ĝia Prezidanto, Marek Pietrzak, kiu dum la kongreso estis elektita Vicprezidanto de TEJO kun la speciala tasko disvastigi Esperanton en la orientaj landoj. Li jam energie transprenis tiun malfacilan taskon kaj ni esperas, ke lia laboro baldaŭ portos bonajn fruktojn. Sed ĉu unu amiko povas plenumi tiel grandegan laboron? Kompreneble ne; li povas tion nur fari kun la helpo de aliaj, de niaj organizaĵoj kaj de unuopuloj, kiuj komprenas, ke nur komuna laboro bone planata sur monda skalo povas antaŭenigi nian aferon. Same tio validas por la taskoj de ĉiuj aliaj Estraranoj de TEJO. Ili povas nur bone labori, se ili havas la subtenon de la Esperantista mondo ĝenerale kaj precipe de la junularo. Tiu kunlaboro povas esti des pli facila nun post la fino de la Zamenhofa Jaro sur la bazo de la novaj pozicioj atingitaj per senĉesa laboro kaj varbado inter tiuj homoj, kiuj havas malfermitan orelon por la interpopola interkompreniĝo, tiel ke la Zamenhofa Jaro fariĝu komenciĝo de nova epoko por la Esperantista Junularo. Dum ĉiu jaro ni renkontiĝu en pli kaj pli granda nombro dum niaj kongresoj, en ĉi tiu jaro mi ĝojas jam revidi la malnovajn geamikojn kaj konatiĝi kun multaj novaj dum nia 16-a Internacia Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu refoje okazas en Nederlando, en la lando, kie okazis la unua Internacia Junular-Kunveno en

la jaro 1938, en Groet, organizita de Ges-roj van Veenendaal, el kiuj S-ro Cornelis Josinus van Veenendaal bedaŭrinde mortis en la lasta julio. La urbo de la Centra Oficejo de UEA, Rotterdam, certe disponas pri la antaŭkondiĉoj por sukcesa kongresa laboro, kaj niaj nederlandaj geamikoj faros ĉiukaze ankaŭ ĉion eblan por prezenti al vi belan kongresan semajnon en Nederlando, al kiu mi same kore invitas vin.


Günther Becker
Prezidanto de Tutmonda
Esperantista Junulara
Organizo

SEMINARIO POR JUNULARAJ GVIDANTOJ EN LESCE-BLED

Esperantaj seminarioj por junularaj gvidantoj fariĝis jam tradicio. Ili okazas jam tri jarojn en organizo de la Jugoslavia Esperanto-Federacio kaj la Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio dum la plej belaj monatoj en la jaro — Julio kaj Aŭgusto.

Jam post tri kvaronoj de horo oni piede povas atingi belegan kaj konatan lagon Bled. Duonhora veturo per la vagonaro de Bled kaj oni troviĝas jam denove ĉe bela lago — ĉi foje Bohinj. Ambaŭ lagoj estas belaj, sed inter ili ekzistas diferenco. Bled estas tre vigla turista loko; Bohinj, kontraŭe, estas preskaŭ netuŝita natura belaĵo, trankvila, ĉirkaŭita per pinarbaro. Ses kilometrojn de Bled troviĝas Vintgar — dukilometra kanjono de la rivero Sava Bohinjka. Sur ambaŭ flankoj estas 40-50 metrojn altaj rokoj surkreskitaj per verdaĵo. La rokoj, akvo, akvofaloj kaj ludado de sunradioj faras belegajn impresojn.

La tendumado daŭras kutime po dek tagojn kun la celo ke la junularo dum tiu tempo de komuna vivo kaj dum diversaj ekskursoj pli bone konatiĝu inter si kaj pliperfektigu en la lingvo. En ĉiu grupo estas ĉirkaŭ 30 gejunuloj



el la tuta lando. Dum la lasta tagdeko, de la 10.-20. VIII. okazas Seminario por junularaj gvidantoj. Per tio oni preparas novajn gvidantojn por la movado. La ĉijara programo konsistis el kvar prelegoj (P. Zlatnar: "Graveco de nia movado" kaj "Problemo kaj demando de kultura aktiveco de niaj societoj", M. Dobčnik: "Internaciaj organizaĵoj", M. Gjivoje: "Historio de la Esperanto-movado en Jugoslavio") kaj diskutoj kaj disputoj. La vivo mem en la tendaro estis tre vigla. Krom ekskursoj estis organizitaj tendaraj fajroj kun ŝerca programo kaj danco. La tendumadon ĝis nun partoprenis tre malmultaj eksterlandaj gejunuloj. Ni tre ĝojos, se venontjare ni povos renkontiĝi kun pli multaj.

Mirjana Simić

TEJO FUNEBRAS

La 31-an de Julio mortis en Limmen Cornelis Josinus van Veenendaal, 73-jara, edzo de la Honora Membro de TEJO, s-ino E. Veenendaal-Bouwes. Kun sia edzino li dum longaj jaroj laboris por la esperantista junularo kaj por Tutmonda Junular-Organizo, la tiama TEJO. Ek de la 1934-a li kaj lia edzino eldonis kaj redaktis la gazeton "La juna vivo", organon por la junularo; ili estis geïnstruitoj kaj ili spertis en la vilaĝa lernejo, ke Esperanto donas al la junularo rimedon por pli bona kono de la mondo kaj de ĝia loĝantaro; daŭre ili instigadis la legantaron al verkado por la organo, kaj kiam ni foliumas en la tiamaĵ jar-kolektoj ni vidas, ke ili plenrajte fieris pro la rezulto. En la 1938-a li kaj lia edzino proponis okazigi Internacian Junular-Kunvenon en Groet (Nederlando); ili mem, kun la helpo de la lernejestro s-ro Bant, organizis la kunvenon, kiun partoprenis 200 gejunuloj el 10 landoj; ĝi estis la unua el la brila serio de la kunvenoj, pasintjare daŭrigita de la kunveno en Gdańsk. TEJO, naskiĝinta en tiu kunveno en Groet, deziras memori sian pioniron kaj esprimas al sia Honora Membro s-ino van Veenendaal la plej sincerajn kondolencosentojn.

KOREKTO

La redaktoro ricevis poŝtkarton kun la jena enhavo:

"Kara Amiko, laŭ la nova statuto de TEJO oni devas diri "Junulara Kunveno" anstataŭ "Junular-". Plie, ĉu oni ne decidis en Gdańsk pri la nomigo "Junulara Kongreso" por akcenti ĝian gravecon? Bonvolu aperigi korekton en "IJV". Sincere via Paul Ciliga (Parizo)."

La Kongresa Regularo, akceptita dum la 15-a IJK, laŭ jura starpunkto, validas apenaŭ por la 16-a. Tial la 15-a estis Internacia Junulara Kunveno, kaj la 16-a estos Internacia Junulara Kongreso.

Redaktoro



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

Sub la Alta Protektado de
L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgoj

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 Novembro 1959

Honora komitato :

La Honora Komitato de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto estas formita el jenaj personoj :

Alta protektanto :

Lia Moŝto Baŭduino, Reĝo de la Belgoj.

Membroj :

S-ro Paul Struye, Prezidanto de la Senato.

Barono Kronacker, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj.

S-ro Gaston Eyskens, Ĉefministro. Ŝtatministro Camille Huysmans, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj.

Ŝtatministro Frans Van Cauwelaert, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj.

Ŝtatministro Achille Van Acker, estinta Ĉefministro.

S-ro Charles Moureaux, Ministro pri Publika Instruado.

S-ro P. W. Segers, Ministro pri Komunikadoj.

S-ro Pierre Harmel, Ministro pri Kulturaj Aferoj.

S-ro J. de Néeff, Provincestro de Brabant.

S-ro Louis Cooremans, deputito, Urbestro de Bruselo.

Adreso : 45-a Universala Kongreso de Esperanto — Bruselo.

Telegramoj : Esperanto Bruselo.

Banko : Banko de Bruselo.

Poŝtgironto : Universala Kongreso de Esperanto n-ro 1776-71 — Bruselo.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3 Novembro 1959

Kotizoj :

Ek de la 1-a de januaro 1960 validas jenaj novaj kotizoj :

— Kongresano 525.— b.fr.

— Edzino de kongresano 265.— b.fr.

— Junul(in)o ne pli ol 20-jara kaj studentoj 185 b.fr.

Karavanoj :

Anoncis karavanon :

— Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Parizo, Francujo.

— Itala Esperanto-Federacio, S-ro G. Grattapaglia, Via Gravera 23, Torino, Italujo.

Dua bulteno :

Ek de februaro 1960 ĉiu aliĝinta kongresano ricevos la Duan Oficialan Bultenon. La 24-paĝa broŝuro, ilustrita,

enhavos la provizoran programon de la Kongreso, informojn pri ĉiuj aranĝoj ligitaj kun la Kongreso kaj kompletajn instrukciojn pri loĝado kaj ekskursoj.

Fakaj kunvenoj :

La esperantistaj fakaj asocioj, kiuj deziras organizi fakajn kunvenojn dum la Kongreso, estas petataj anonci sin ĉe la Kongresa Komitato ĝis fino de januaro 1960.

Hoteloj :

Jen la provizoraj prezoj por loĝado en Bruselo, inkluzive de matenmanĝo, servoj kaj impostoj :

Hoteloj :

Kat. 1 (luksa) ĉ. 270.— b.fr. por tago kaj persono.

Kat. 2 ĉ. 190.— b.fr. por tago kaj por persono.

Kat. 3 155.— b.fr. por tago kaj por persono.

Kat. 4 ĉ. 120.— b.fr. por tago kaj por persono.

En venonta komuniko aperos la prezoj de komuna loĝejo kaj de aliaj loĝkategorioj.

La Loĝiga Servo de la Loka Kongresa Komitato, en kunlaboro kun profesia Vojaĝagentejo, zorgos pri la enloĝigo de ĉiu kongresano, kiu petos tion post ricevo de la Dua Bulteno.

T.E.J.O.-Kongreso :

La 16-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okazos en Rotterdam de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1960 en la komunuma konferencejo "De Tempel" :

Kotizoj por membroj de T.E.J.O. : malpli ol 20-jaraj - ĝis 1.4.1960 ned.gld. 70.—; ĝis 1.7.1960 ned.gld. 75.—.

Pli ol 20 jaraj - ĝis 1.4.1960 ned. gld. 75.—; ĝis 1.7.1960 ned. gld. 80.—.

Nemembroj de T.E.J.O., devas pagi ned. gld. 4.— plie. Ĉar la nombro da lokoj en la Konferencejo estas limigita, frua aliĝo estas konsilata.

Provizora programo : Interamikiĝa vespero, solena inaŭguro, kongresa balo, tuttaga ŝipekskurso, du duontagaj ekskursoj (unu per ŝipo kaj unu per aŭtobuso), vizito al la internacia ekspozicio "Floriade", kulturaj prelegoj (kun partopreno de eminentaj esperantistoj), oratora kaj sporta konkursoj, solena fermo.

Ilustrita prospekto kun ĉiuj informoj kaj aliĝilo haveblaj ĉe la Loka Kongresa Komitato, Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

